PUBLIC LIBRARY -4 AUG 1921 OF VICTORIA


# La Suda Kruco

*Organo de la Australaziaj Esperantistoj*

**Redakcio-Administracio:**
Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

**Abono (por dek du numeroj):**
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj, aŭ 24 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 4 respondkuponoj.

N-ro 9. Melburno *(Melbourne)*, Australio. 1 Marto, 1921.


## Queensland W.E.A. Teaches Esperanto.

The University joint committee of [t]he Workers' Educational Associa[t]ion in Queensland has decided to [i]nclude Esperanto in the Association's [s]yllabus.

The classes will be under Mr. [H]. W. R. Holken, and will begin on [t]he 29th of March.

---

## The Awakening of Italy.

After many years of quiet, the [E]speranto movement in Italy is [v]igorous again.

The fifth Italian Congress of Esper[a]ntists was held recently in Bologna, [a]nd delegates from all parts of the [c]ountry were present.

The striking feature of the meet[i]ng was the whole-hearted support [w]hich it received from many official [i]nstitutions—the list in "Itala Esper[a]ntisto" is long and imposing, and in[c]ludes ministries, provincial govern[m]ents, municipalities and semi-[o]fficial societies. Many of these sent [r]epresentatives to the congress, [w]hich was presided over by Senator [P]ini.

The principal subject of discussion [w]as the reorganisation of the move[m]ent, in order to take advantage of [t]he growing interest in Esperanto in [I]taly. The renewal of tourist traffic was also noted as a means by which Esperanto might be made useful to many people, and as a result the international tourists' meeting, which is announced elsewhere in this issue, was decided upon.

The teaching of Esperanto in Italian schools is also spreading with the support of educational authorities in places as far apart as Naples, Venice, and Genoa. The use of Esperanto for foreign advertising by commercial fairs and organisations has already been noted.

Antaŭen Italujo!

---

## The League of Nations Resolution.

European journals to hand give an interesting account of the discussion on Esperanto at the League of Nations' Assembly in December. Or rather, lack of discussion, in spite of which hindrance the matter seems to have had a favourable and encouraging reception.

The representatives of ten States (South Africa, Brazil, China, Chile, Colombia, India, Haiti, Italy, Persia, and Czechoslovakia), together with Senator Lafontaine, of Belgium, in his private capacity, submitted the following resolution, which was submitted to the assembly and referred

to the Technical Affairs committee:

"The League of Nations, recognising the linguistic difficulties which hinder direct intercourse between the peoples, and the urgent necessity of doing away with that barrier, in order to help towards good understanding between nations,

follows with interest the experiments in official teaching of the international language Esperanto in the state schools of several states, members of the League,

hopes that that teaching will become general throughout the world in order that the children of all countries may henceforth know at least two languages, their mother tongue and an easy means of international communication,

asks the Secretariat-General to prepare for the next meeting a detailed report of the results achieved in that department."

The Technical Affairs committee, after investigation, presented a very favourable report, recommending an official inquiry into the teaching of Esperanto, and on the 18th December, at the last meeting of the assembly, Senator Lafontaine read this report.

The French delegation, however, strongly opposed it, demanding that the French language should be the official language of the whole world, and asking that no discussion of the matter be allowed. The president of the meeting, Mr. Hymans (Belgium), a well-known opponent of Esperanto, immediately put the question to the vote, proposing that the whole matter be deferred without discussion.

After the voting (by members rising and sitting), which was somewhat confused, and had to be twice begun afresh, the president announced that the matter was deferred. No supporter of Esperanto was therefore able to speak.

This is by far the greatest step forward which Esperanto has yet made. It has been brought officially under the notice of the representatives of many countries, and the mere fact of the strong and eloquent opposition of the delegate of one country is evidence of its growing importance in international affairs.

## The League and Its Languag

The languages most used at meetings of the League assem were, first French and then Engl After every speech a translator st up and summarised it in English French. All the League docume were printed in English and Fre the translation staff alone consis of 46 persons.

Amongst the French translat were the two "docents" of Engl philology in Geneva university, of whom was our gifted Samide Dr. Edmond Privat. A highly app ciative article on Dr. Privat's serv as an interpreter appeared in London "Daily News" of 14th Dec ber.

When the South American de gates proposed that Spanish sho be accepted, for it is the languag nearly half the countries rep sented, it was decided to permit languages, on condition that delegates should provide their translators, except for speeches English and French, for wh translators would be provided by Secretariat.

French was the language m used, often not very fluently or clearly.

There was surely someth humourless in the French dele tion's demand that French should the official language of the wh world—"an easy means of inter tional communication." Easy dou less for the French, but for n autres ——? Reader, have you e tried your French on a Chinaman Chilean, or a Czechoslovak, who like you perhaps spent years in lea ing it, and have you found it easy have a long heart-to-heart talk w him in French?

Although the Japanese delegat did not give its official support to resolution, the chief delegate, Ba Megata, made the matter a subj of inquiry, and afterwards announ that he wishes to advance the stu of Esperanto in official circles Tokio, especially as several To journals were proposing Esperanto the official language of the Leag In the Secretariat of the League a of the Japanese delegation w several Esperantists.

## Grava Movo en Kvinslando.

La Instrua Asocio de Laboristoj en Kvinslando, sub la aŭspicioj de la Brisbana universitato, decidis enkonduki Esperanton en sian programon.

La kursoj komenciĝos en la 29-a de marto, sub la gvidado de sinjoro I. W. R. Holken.

## A.W.U. Aprobas Esperanton.

Ĉe la kongreso en Sidnejo de Australian Workers' Union, t. e. unio (unuiĝo) de Aŭstraliaj Laboristoj, grava kaj influa organizaĵo, oni aprobis rezolucion, ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj.

Ĉi tiun sukceson ni ŝuldas al la klopodoj de kelkaj Sidnejaj samideanoj.

## Kvinslandaj Instruistoj Malakceptas.

En kongreso de la Kvinslanda instruistaro en Brisbano dum januaro, sinjoro Albert E. Church, el Townsville, proponis, ke Esperanto estu en la programo de la regnaj lernejoj.

Sinjoro Church faris elokventan paledon por nia lingvo, sed la kongreso malakceptis per 33 voĉoj kontraŭ 30.

En Finnlando, Estonujo, Hungarujo, Bulgarujo, Saksujo, Ĉeĥoslovakujo. . . sed ankoraŭ ne en Kvinslando.

Lerte verkita artikolo de sinjoro Church pri la instrua valoro kaj sukceso de Esperanto aperis en la revuo "Queensland Educational Journal" antaŭ nelonge, kaj estis represita en la Brisbana taggazeto "Daily Mail."

## Elekto de Parlamentanoj.

Okaze de la elektado de parlamentanoj de la provinco Okcident-Aŭstralio, AEA, kunlabore kun la grupo "Nigra Cigno" en Perth, klopodas por tiri publikan atenton sur la gravecon de Esperanto.

Al ĉiu kandidato oni sendas cirkuleran leteron similan al tiu, kiun oni sendis al la kandidatoj por la Viktoria parlamento antaŭ nelonge. Tiu letero petas la kandidatojn, ĉu ili favoras la uzadon de nia lingvo ĉe la departementoj, kiuj havas rilatojn kun la alilando; kaj ĉu ili favoras ĝian instruadon en la lernejoj de la provinco.

Oni atendas interesajn respondojn.

Ankaŭ en Sud-Aŭstralio la Asocio simile profitas okazon por diskonigi nian lingvon inter la estontaj regantoj de la provinco.

## Por Turistoj en Italujo.

La Itala Esperantista Federacio prenis sur sin la gravan taskon organizi internacian turistan kunvenon en Italujo dum la venonta septembro. Oni povas esti certa, ke la Italaj samideanoj senescepte klopodos fervore kaj sindone por helpi, gastigi, gvidi dum ilia restado kaj traveturado la partoprenantajn turistojn, montrante al ili laŭ la lokoj la plej vidindajn kaj famekonajn naturajn, artajn, historiajn karakterizojn de la diversaj urboj kaj regionoj.

Por la organizado kaj por la efektiviĝo de la Kunveno oni uzos nur Esperanton: do, al la personoj, kiuj deziras viziti en septembro "la belan landon, kie citronarboj floradas," oni konsilas tuj eklerni Esperanton por interkorespondi kaj, poste, por kunparoli kun la gastemaj italaj gesamideanoj.

La I.E.F. penados por havigi specialajn rabatojn de la Italaj Fervojoj kaj marveturadservoj.

Nun estas necese, kiel eble plej baldaŭ, ke la personoj, kiuj intencas partopreni tiun turistan kunvenon, sendu (nepre antaŭ aprilo 1921) po

**The A.E.A. Needs Money!**

**Have you subscribed to the 1921 Appeal yet?**

**Rapida Dono——Duobla dono!**

You can help the "Suda Kruco" by renewing your subscription at the same time: 4/6.

du fotografaĵoj, aldonante: aĝon, profesion kaj precizan adreson por ricevi tute senpage membrokarton, kaj dirante, kiujn nome urbojn ili deziras viziti al la Centra Komitato de I.E.F. (Via Spiga, 29-Milano, Italujo).

———

## Kroniko.

**Gisborne,** N.Z.—La grupo kunvenas ĉe sinjoro Crawford, drogisto, ĵaŭde, je sepa horo. Taggazeto, "Poverty Bay Herald" raportas de tempo al tempo.

**Dorrigo,** N.S.K.—Grupo deknaboskoltoj estas starigita sub la gvidado de sinjoro F. O. Sherriff.

**Sidnejo,** N.S.K.—Novaj oficistoj de la Sidneja Esperanto-Societo estas: prezidanto, sinjoro J. A. Jolliffe; vicprezidantoj, fraŭlino Ethel Lee kaj sinjoro Campbell Laird; sekretario, sinjoro L. E. Pfahl; helpsekretario kaj kasisto, sinjoro Martin Miller. Jarraporto montris kontentigan progreson kaj agadon.

Rezolucio pri la instruado de Esperanto en regnaj lernejoj staras sur la tagordo de la Aŭstralazia Laborista Partio, kunvenonta je Pasko.

Daŭre aperas trafaj, mallongaj artikoloj en fabrikista revuo "The Australasian Manufacturer."

**Auckland,** N.Z. — La "Auckland Labour News" (monata laborista revuo) donas en ĉiu numero unu paĝon da bone verkitaj notoj pri nia lingvo.

**Melburno** V.—Bonaj kunvenoj malgraŭ ke (pro striko kaj manko de karbo) tramoj tute ne iris vespere kaj trajnoj nur malofte; okazis granda forkuro je dek minutoj antaŭ la deka, por trafi la trajnojn por diversaj lokoj je la deka. z

Antaŭ nelonge oni aranĝis amuzan enketon (commission of inquiry) pri la kosto de la vivo; fidele al la kutimo de la veraj enketoj, oni ne anoncos la decidon ankoraŭ dum longe, tre longe.

Okazis ekzameno por la diplomo de BEA; dek kandidatoj.

**Townsville,** Kvinslando. — La studado bone progresas. Oni esperas baldaŭ aranĝi ekzamenon por diplomo.

## Here and There.

At **Athens** there is an Esperan class in one of the trades scho There is also a class among the B garian prisoners-of-war.

The Primate of the Catho Church in **Denmark,** Bishop v Euch, who is very popular al among Protestants, recommen Catholics to take up the study Esperanto.

The twelfth international **Sho hand Congress** at Strasburg decid to accept the use of Esperanto in future international meetings.

The eighth congress of the int national **Woman Suffrage Allian**ce Geneva decided to recommend delegates to future congresses learn Esperanto, and to urge t affiliated societies to have Esperan introduced into the state schools "a highly efficacious means of dir concord between the peoples."

The congress of Bulgarian **To Abstainers'** Societies for young pe ple passed a resolution in favour the use of Esperanto in their inte national relations.

The manager of the much-adv tised **Finnland Fair** has stated th the Esperanto advertising was mu more successful than the advertisi conducted by the Ministry of Forei Affairs.

The manager of the **Commerc Fair of Reichenberg,** in Czechos vakia, informed a prominent Esp antist of that country that t Esperanto advertising of the fair h been entirely successful, and that t management of the fair is now co vinced of the practical utility Esperanto.

Much activity is noted in **M seilles.**— Local Esperantists have se a considerable sum of money for t relief of Austrian children.

The international **Exhibition Architecture,** to take place in Ghe in April, May and June of this ye is sending out invitations in Esp anto. A sub-congress of Esp antist architects and contractors proposed.

The well-known Wisbech (En land) **Peace Society** states in year-book that it has found Esp anto of very great practical use getting into touch with persons other countries.

# A Poem and a Lesson for a Beginner.

**One of the best means of learning a language is to commit pieces of poetry in it to memory. The following translation by Grabowski of Longfellow's poem, "The Arrow and the Song" is not only an admirable specimen of Esperanto poetry, but gives many useful examples of the structure of the language.**

## La Sago kaj la Kanto.

Mi pafis sagon en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron;
La forfluganta tiel rapidis,
Ke mi la kuron tute ne vidis.

Mi spiris kanton en la aeron,
Ne scias, kie ĝi falis teron!
Eĉ la plej bona akrevidanto
Ne povas sekvi flugon de l' kanto.

Mi longe poste, unu tagon,
En kverko trovis la tutan sagon;
La tutan kanton kun la muziko
Mi trovis en la kor' de amiko.

## The Arrow and the Song.

I shot an arrow into the air,
It fell to earth, I knew not where;
For, so swiftly it flew, the sight
Could not follow it in its flight.

I breathed a song into the air,
It fell to earth, I knew not where;
For who has sight so keen and strong
That it can follow the flight of song?

Long, long afterward, in an oak
I found the arrow, still unbroke;
And the song, from beginning to end,
I found again in the heart of a friend.

1. MI. The first personal pronoun **I**, sounded like the English **me.** An infant in its first attempts at speech, usually uses **me** instead of **I,** so it unconsciously expresses itself in good Esperanto.

2. PAF-IS. Esperanto words, as a rule, consist of two main parts —the root—expressing only an idea—and a suffix or affix completing the word and giving it its grammatical meaning. Here the root **paf** expresses the idea of shooting; the affix **is** gives the idea the grammatical character of a verb in the **past tense.**

3. SAG-ON. **Sag**—arrow; **o,** noun affix; **n,** accusative or objective ending, corresponding to the **m** in the English words **whom, him, them. Sagon** is the direct object of the sentence. In Esperanto the object is always indicated, which permits extraordinary flexibility and precision in the use of language.

4. EN. Preposition—in, with accusative (see 6)—into.

5. LA. The definite article—the. There is no indefinite article (**a** or **an**) in Esperanto.

6. AER-ON. **Aer**—air; **o,** noun affix; **n,** accusative ending. This is an example of the accusative of **direction** or **motion towards.** Note the pronunciation. Sound every letter. Three syllables in this word.

7. NE. The negative particle—not. Immediately precedes the word it negatives.

8. SCI-AS. **Sci**—know; **as,** verb, present tense—know. **Mi ne scias**—I do not know. Pronounce: **mee nest see-ahs.** Repeat this several times till you have got your tongue over this peculiarity of Esperanto pronunciation.

9. KIE. In what place—where. Pronounce: **key-eh.**

10. ĜI. 3rd personal pronoun—it.

11. FAL-IS. **Fal**—fall; **is,** verb; past tense—fell.

12. TER-ON. **Ter**—earth; **o,** noun; **n,** accusative of direction—to earth.

13 (5). FOR-FLUG-ANTA. An interesting example of word-building : **for**—away; **flug**—fly; **ant**—present participle active; **a,** adjective ending. Literally, an adjective affirming that the arrow is flying away.

16. TIEL. That how—so.

17. RAPID-IS. **Rapid**—quick; **is,** past tense. Literally, the flying arrow so rapided, i.e., went so quickly.

18. KE—that.

19 (1) (5). KUR-ON. **Kur**—run (course); **o,** noun; **n,** accusa-

tive. An example of the rearrangement of words **Mi tute ne vidis la kuron,** permitted by the use of the accusative.

20. TUT-E. **Tut**—whole; **e,** adverbial ending—wholly.

21 (7). VID-IS. **Vid**—see; **is,** verb, past tense—saw.

22 (1). SPIR-IS. **Spir**—breath; **is,** verb, past tense—breathed.

23. KANT-ON. **Kant**—song; **o,** noun; **n,** accusative [4-12].

24. EĈ—even. Pronounce like **etch.**

25 (5). PLEJ—most.

26. BON-A—**bon**—good; **a,** adjective; **plej bona**—most good—best.

27. AKREVIDANTO. Another good example of word-building; **akr**—sharp, keen; **e,** adverb; **vid**—see; **ant**—present participle; **o,** noun. That which is seeing keenly.

28 (7). POV-AS. **Pov—can;** as, verb, present tense.

29. SEKV-I. **Sekv**—follow; **i,** infinitive. **Ne povas sekvi,** literally, not can to follow—cannot follow.

30. FLUG-ON. **Flug**—fly; **o,** noun; **n,** accusative.

31. DE. Preposition—of.

32. L'. **La** with elision. Practically confined to poetry. The rule is that the elision of **la** may take place either before a vowel or a consonant, but in the latter case, of which this is an example, only when the article is preceded by a preposition ending in a vowel, for then the **l** of the article can be sounded with the preposition and the full pronunciation given to the first consonant of the following word, thus: **del kanto.**

33 (1). LONG-E. **Long**—long; **e,** adverb.

34. POST-E. **Post**—after; **e,** adverb.

35. UNU. Numeral—one.

36. TAG-ON. **Tag**—day; **o,** noun; **n,** accusative. An example of the accusative used to denote a point of time.

37 (4). KVERK-O. **Kverk**—oak; **o,** noun.

38. TROV-IS. **Trov**—find; **is,** verb, past tense.

39 (5). TUT-AN. See 20; **a,** adjective; **n,** accusative. Adjectives take the number and case of the nouns which they qualify. **Tutan sagon,** see 3.

40. KUN—with.

41. (5) MUZIK-O. **Muzik**—music; **o,** noun. Compare **mi . . . trovis la tutan sagon** with **la tutan kanton . . . mi trovis.** An example of the flexibility permitted by the use of the acusative, without loss of precision.

42. KOR'. **Kor**—heart. The noun ending is elided. This can only take place with a noun in the singular and in the nominative. The tonic accent remains on the same syllable on which it would fall if no elision had taken place.

43 (31). AMIK-O. **Amik**—friend; **o,** noun.

---

## Recenzo.

**Ses Noveloj,** el la Hungara literaturo, de Jokai, Mikszath, Herczeg kaj Molnar. Eldonita de Hungara Esperanto-Servo, Hajos-u. 15, 11.2, Budapest VI, Hungarujo. Prezo, 6 pencoj.

Interesa, foje kortuŝa, foje amuza rakontaro. La aŭtoroj estas la ĉefaj verkistoj de sia lando, kaj la verkoj montras diversecon de talento, sed unuecon de tuthomara intereso. Precipe frapas la novelo "La Blanka Paperfolio," kiun la amitino de milionulo plenigas per promeso pagi... grandan monsumon? Ne, sed per promeso ami ŝin ĝis la morto, afero jam tute neebla por la riĉiĝinta aminto. "La Simio" estas ludilo, kiu ŝvelas kaj ŝveladas al nekredebla grandeco en la domo de la infano ŝtelinta ĝin, ĝis la penta infano redonas ĝin al la rajta posedanto, kiam ĝi tuj reiras al normala grandeco. La traduko estas de diversaj manoj; la Esperanta stilo estas meze bona.

**Angla kaj Esperanta Etimologio,** de Charles G. Stuart-Menteth, submagistro de Artoj en Oksforda Universitato. Eldonita de BEA, 17 Hart-str:, London, W.C.1, Anglujo. Prezo, 10 pencoj, aŭ 4 respondkuponoj, afrankite.

La studento de vortoj, de ilia

deveno kaj parenceco, trovos riĉan materialon en ĉi tiu verketo. Legante la vortlistojn, oni nepre konstatas, ke nia Esperanto estas eĉ pli proksima al la Angla lingvo, ol ni supozis; granda nombro da Esperantaj radikoj estas kvazaŭ enterigita en longaj Anglaj vortoj. Sed malfeliĉe por la Angla, tiuj radikoj ne povas esti uzataj memstare. Ni povas paroli pri "indentation" aŭ "dentist," sed denton ni ne povas nomi "dent"; tiu substantivo havas alian signifon. Ni havas "jury" kaj "perjury," sed ni ne povas "jure" en tribunalo; ni devas "swear."

La "Pruvo, ke la Korelativaj Vortoj estas de Natura Deveno" estas interesa, kaj certe helpos la lernantojn, eĉ se ĝi ne estas tre konvinka.

La tuta libreto multe helpos al lernantoj kaj progresintoj akiri kun malgranda peno sufiĉe grandan vortkolekton por ĉiutaga uzado.

**Which Shall It Be?** Propaganda folio, ok-paĝa, de Montagu C. Butler; eldonita de BEA. Prezo, ½-penco por unu, 3 ŝilingoj por 100.

Lerte verkita, nepre konvinka propagandilo, de la multe talenta sekretario de BEA, sinjoro M. C. Butler, kun kelkaj plej freŝaj faktoj, kaj multe da trafaj argumentoj. Propagandistoj devus ne nur disdoni ĉi tiun folion, sed ankaŭ mem studi ĝin.

---

## Kriketisto-Esperantisto.

Inter la subskribintoj de la rezolucio pri Esperanto ĉe la kunveno de la Ligo de Nacioj sin trovas la princo (maharaja) de Nawanagar. Por ni Aŭstralianoj li estas pli bone konata kiel la fama ludanto de kriketo (cricket), princo Ranjitsinghi, kiu vizitis nian landon en 1897-8 kun Angla ludistaro.

Aliaj notindaj subskribintoj de la rezolucio, kaj tial subtenantoj de Esperanto, estas Lord Robert Cecil (membro de la Sud-Afrika delegitaro), sinjoro Wellington Koo (Ĉinujo) kaj la Emiro Zoka ed Dowleh (Persujo).

---

The **Brussels** annual fair is using Esperanto in its foreign correspondence.

## "The Esperanto Guide."

### Translation of the Exercises.

**Exercise 15.**—Unu tagon, kiam mia amiko kaj mi promenis apud bela fonto, malriĉa virino, tre maljuna, venis al ni. Ŝi portis grandegan kruĉon. Ŝi petis nin, ke ni donu al ŝi trinki kaj ĉerpu por ŝi akvon el la fonto. "Tre volonte, mia bona," ni diris al ŝi. Mia amiko lavis la kruĉon kaj ĉerpis iom da akvo en la plej pura loko en la fonto. Poste (or: tiam) mia amiko donis al la maljuna virino trinki, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke ŝi povu trinki oportune. Kiam ŝi trankviligis la soifon, la maljuna virino diris al ni, "Vi estas tiel belaj, tiel bonaj kaj tiel honestaj, ke mi volus povi fari al vi donacon; sed mi estas nur malriĉa vilaĝanino, tial mi povas nur danki vin por via ĝentileco kaj bonkoreco." Ĉe ĉiu vorto, kiun ŝi diris, ŝi rigardis multekostan ŝtonon, kiu brilis sur la fingro de mia amiko. Pro tio ni pensis, ke ŝi bezonas monon kaj ne kuraĝas peti ĝin de ni.

**Exercise 33.**—Via palto ne estas pura; donu ĝin al mi, por ke mi brosu ĝin. Malmola kiel diamanto, maldika kiel haro, malvarma kiel marmoro—ĉi tiujn esprimojn oni uzas en diversaj lingvoj. Vi estas nek tre granda nek tre malgranda, sed de ordinara kresko. Ĉi tiu pordo estas multe tro mallarĝa, aŭ pli ĝuste mi estas tro dika. Nu, pasu tra la fenestro, se vi trovas la pordon tro mallarĝa. Kial malbeni vian sorton, ĉar vi sentas vin malgaja? Vi estas ankoraŭ juna. Kial malesperi? Ĉu vi estas malsana? Jes, iom; malfermu la fenestron rapide; mi bezonas aeron; estas tro varme ĉi tie. Li estas malhonestulo; ĉiuj malestimas lin. Rigardu supren sur la tegmenton. Li kuris malsupren al la valo. Ĉu vi vidas vian patrinon, kiu venas kun via fratino kaj via juna kuzino? Vi tro rapidis; vi malbonigis vian tutan laboron. Malkreski; maldika; bopatrino.

---

## Bonvolu Noti!

**La proksima numero de "La Suda Kruco" (duobla numero, kun 16 paĝ'oj) aperos en komenco de Majo.**

## A.E.A. Appeal.

### Further Gifts.

So far, the response to the appeal for funds, to enable the Association to set up a central book depot and to engage in direct propaganda, has been—well, mild.

Is the financial burden still to be borne by the same few who have borne it in the past? Even some of these are showing signs of discouragement.

Or will every member come forward and give something, even a little?

The following members have already given, besides those shown in the last list (totalling £16/17/-):

Mr. C. H. Parker (Auckland, N.Z.), 10/-; Mr. Sherriff, 5/-; Mr. Schubert, 10/-; Mrs. Tilbury (to date), 5/-; Mr. C. L. Clarke (to date), £1; Mr. L. E. Pfahl, 10/-; Mr. Belcher, 10/-; Mr. Whitby, 10/-; Mr. C. Frewer, 5/-; Miss Saw, 10/-; Mr. G. Gordon, 10/-. Total, £22/2/-.

## Gazetoj Ricevitaj.

**Esperanto Triumfonta,** n-roj 10, 11 kaj 12; (mankas n-roj 8 kaj 9). **Hungara Esperantisto,** n-roj 11 kaj 12. **Itala Esperantisto** (Esperanto Itala Revuo), n-ro 9. **Nia Folieto,** sept.-okt.-nov. (lasta numero; ĝian lokon prenos reaperanta "Belga Esperantisto"). **Universo,** n-ro 3. **Nova Tempo,** n-roj 10-11. **Verda Utopio,** n-ro 5. **Revuo Orienta,** n-roj 11 kaj 12. **Germana Esperantisto,** n-ro 11 (mankas n-ro 10). **La Progreso,** n-ro 9. **Hispana Esperantisto,** n-roj 42, 43 kaj 44). **Verda Ombro,** n-ro 11 kaj 12. **Esperanta Finnlando,** n-roj 1 ĝis 12. **Amerika Esperantisto,** n-ro 1. **Esperanto-Praktiko,** n-roj 24 kaj 25. **Espero Katolika,** n-roj 11-12. **La Monde Esperantiste,** n-ro 6. **Kataluna Esperantisto,** n-ro 1 (dua epoko). **Argentina Esperantisto,** n-roj 37 kaj 38. **Bulgara Esperantisto,** n-ro 1. **Unuigita Tuthomaro,** dec. **L'Esperanto,** n-roj 8-9 kaj 10-11. **Franca Esperantisto,** n-roj 9 kaj 10.

## Nova Sekretario de AEA.

Ĉe la Melburna kunveno de la AEA-konsilantaro en 4 marto, oni ricevis kun bedaŭro la eksiĝon (pro multokupeco pri siaj negocaj aferoj) de la sekretario, sinjoro L. E. Thomson.

Nia movado per tio perdas valoran laboranton.

La konsilantaro nomis sinjoron Clarence Kelly (bibliotekisto) sekretario en la loko de sinjoro Thomson.


NOVA TEMPO

**La mezeuropa esperanta kulturgazeto; sendependa. Ankau je VIA dispono. Eliras monate.**

**Sendu 4s./6p. al Box 1367, Elizabeth-str: P.O., Melbourne.**


Sinjoro Paul Brocherion, 6 ave. du Maine, **Paris** (Francujo), deziras interŝanĝi ilustritajn p. k. (m. bfl.) kaj p. m. Francajn kaj koloniajn.

Por 100-1000 p. m. mi tuj sendos flugpoŝtajn, oficajn kaj aliajn samkvante. Prof: Dyba, gimnazio, **Berlin,** Niederschonhausen (Germanujo).


# Cole's Book Arcade, Melbourne.

**Two Million Books and Pieces of Music.**
**Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.**

**Free to You.**


Printed for the Proprietors, The Esperanto Journal Committee, 87 Peel Street, Windsor, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne St., Windsor.